

# Eŭropa Bulteno

JANUARO 2011, N° 1 (101)

---

- [Internacia patrinlingva tago](#)
  - [Germana esperanto-asocio kaj la stato de esperanto en Germanujo en la jaro 2011](#)
  - [Hungaraj esperantistoj informas pri EU-aj aferoj en esperanto](#)
  - [Esperanto en la interpretista trejnado en Strasburgo](#)
  - [lingvo-org tre rekomendinda](#)
  - [Senperforto: Eŭropa esplorprojekto referencas al Esperanto](#)
  - [Svisa esperanto-kongreso](#)
  - [Nova agnosko de Esperanto ĉe verduloj](#)
  - [Kiu lingvo estas vere natura?](#)
  - [Reage al raporto pri eunom-konferenco](#)
  - [AEPA - apliko de Esperanto en la profesia agado](#)
  - [Brita Esperanto-kongreso en Eastbourne 2011](#)
  - [Kroata urbeto Koprivnica elektis esperantiston persono de la jaro 2011](#)
- 

## Internacia Patrinlingva Tago



Invito al Landaj Esperanto-Asocioj en Landoj de EU

Estimataj!

La estraro de EEU pridiskutis la manieron kiel uzi la Tagon de Gepatraj Lingvoj por fari signifan agadon por Esperanto kaj decidis proponi al vi la jenan kampanjon:

Landaj E-Asocioj en EU-landoj traduku la suban leteron al siaj naciaj lingvoj kaj sendu ĝin sianome al eŭropaj parlamentanoj de la propra lando tiel ke tiuj ricevu ilin ĉirkaŭ la 20-a de februaro (la internacia tago de gepatraj lingvoj estas la 21-a de februaro) kun subskribo de sia prezidanto kaj prezidanto de EEU

**Zlatko Tišljár.**

Estimata EU-parlamentan(in)o.....!

Okaze de internacia Tago de Gepatraj Lingvoj proklamita de UNESKO (21-a de februaro) Eŭropa Esperanto-Unio kaj nia landa asocio volas atentigi Vin pri la neceso almenaŭ unufoje jare fari iom pli por konscii eŭropanojn pri graveco de gepatraj lingvoj kaj egalrajteco de ĉiuj gepatraj lingvoj ĉu naciaj ĉu minoritataj.

Tial ni rekomendas al vi rigardi la paĝaron de Asocio por Eŭropa Konscio sur kies portalo [www.wix.com/dtisljár/europa](http://www.wix.com/dtisljár/europa) vi povos vidi ekzemplan manieron batali por komuna eŭropa konscio aplikante la principon de egalrajta multlingveco uzante ĉiujn oficialajn eŭropuniajn lingvojn.

Ni kredas ke la paĝaro de AEK plaĉos al vi kaj ke vi rekomendos ĝin al laŭeble multaj institucioj eŭropaj ke ĝi servu kiel ekzemplo por aliaj eŭropaj instancoj kaj asocioj.

Prezidanto de .....Landa Asocio:

Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio

*Seán Ó Riain*

## NIAJ LANDAJ ASOCIOJ:

### GERMANA ESPERANTO-ASOCIO KAJ LA STATO DE ESPERANTO EN GERMANUJO EN LA JARO 2011

Antaŭ ĉirkaŭ 40 jaroj mi lernis Esperanton, nur kelkajn jarojn poste mi komencis labori por Germana Esperanto-Asocio (GEA). Por prijuĝi la nunan staton de GEA, mi tial ĉefe komparas ĝin kun la stato de antaŭ 35 jaroj. La membronombro estis tiutempe sub 1000, Germana Esperanto-Junularo (GEJ) malgranda grupo; nuntempe almenaŭ ne estas pli malbone. Sed precipe en la 80-aj jaroj floris la movado en Germanujo. Ĉirkaŭ la jubilea jaro la nombro de membroj trovis sian kulminon (ĉ. 1.600), sed poste ĝi ĝis nun konstante ŝrumpis, ĉiujare al aktuale 869. Same GEJ spertis grandan periodon kun malmultnombriĝo je pli ol 300 membroj ĝis la defalo al nun 103 fine de 2010



Ĉiam la homoj volas nur nombrojn por mezuri staton. Ĉu tio ne estas misgvida? Ni komparu aliajn aspektojn. En la 70-aj jaroj GEA havis ege malmultajn aktivulojn, kiuj faris tutlandan laboron. Sed ekzistis relative densa reto de lokaj grupoj kun vigla verda vivo, preskaŭ sendependa de GEA. La Germana Esperanto-Kongreso, tiutempe la centra tutlanda aranĝo, iĝis pli grava dum la lastaj jaroj, ĉar GEA kongresis kune kun najbaraj asocioj aŭ kun Eŭropa Esperanto-Unio. En la 80-aj jaroj naskiĝis "Esperanto aktuell", ekiĝis la unua centra membroadministrado per komputilo, eksplodis la Internacia Seminario, aldoniĝis la Internacia Festivalo, okazis la

Printempa Semajno Internacia, laboris vigla estraro kun multaj komisiitoj, ĉiuj honor-oficaj.

La 90-aj jaroj vidis la unuiĝon de GDREA kun GEA, sed la kresko de la membraro estis nur portempa. Post la 100-jara jubileo de Esperanto ankaŭ tiuj, kiuj longe revis pri la "fina venko", perdis tiun esperon kaj direktis sin al praktika uzo de Esperanto, al scienca esploro de planlingvoj (fondo de Gesellschaft für Interlinguistik) aŭ al simpla ĝuemo. El "samideano" iĝis "kliento", kiu postulas servojn kaj amuziĝon.

Tio gvidis al la nuna situacio. Lokaj grupoj kaj fakaj ligoj en Germanujo velkas kaj malaperas. Regionaj kaj tutlandaj aranĝoj tamen trovas bonan eĥon. Ne nur GEA kaj GEJ, ankaŭ privatuloj ekster GEA ofertas ĉiujare plurajn internaciajn eventojn kiel la Internacian Festivalon (Hans-Dieter Platz)

kaj Novjara Renkontiĝo (Lu von Wunsch-Rolshoven/EsperantoLand).

Ekde kelkaj jaroj la turisma urbeto Herzberg ĉe montaro Harz nomas sin "Esperanto-urbo". Tie aktivas Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, kiuj zorgas por tio, ke Esperanto estu tie ĉie videbla kaj renkontebla, eĉ la urbestro lernis Esperanton. Kursoj okazas en pluraj lernejoj, kaj viglas la ĝemelaj kontaktoj al la Pola urbo Góra [gura] helpe de Esperanto.



GEA havas en Herzberg sian klerigan centron (ICH), kie s-ino Kóródy, modeste pagata de GEA, organizas klerigadon de Esperanto-instruistoj, surbaze de la ILEI-regularo. Cetere estas ege malfacile, trovi honor-oficajn aktivulojn: Iuj ne havas tempon pro profesia streĉo, aliaj ne havas monon pro senlaboreco. Nuntempe GEA havas du pagatajn dungitojn kaj unu helpanton. Tamen ĝi havas ekde du jaroj oficejon en Berlin kaj tial estas trovebla en la ĉefmetropolo de Germanujo. Ĝus la membronkunveno draste altigis la GEA-kotizojn, pro kio la membronombro certe pluŝrumpas, sed laŭ unuaj esploroj forfalis ĉefe familianoj. Rezulte GEA volas havi pli da financaj fortoj por sia origina celo: plivastigo de Esperanto.

Al tiu celo relative juna GEA-estraro nun volas pliplugi la kampojn, sur kiuj estis kelkaj progresoj dum la lastaj jardekoj:

- Plusubteno de la kleriga centro de GEA en Herzberg,
- lanĉado de pliaj kursoj en universitatoj, kie la pordoj por Esperanto estas pli malfermitaj ol en la antaŭaj tempoj,
- pli ofta apero en ne-Esperantaj medioj (precipe Interreto, alternativaj grupoj kaj kampanjoj, sed ankaŭ sociaj kaj politikaj instancoj).

Oni povas jam konstati, ke Esperanto akiris certan renomon en progresema tavolo de la socio. Nia lingvo staras por idealo de humanisma, vivinda mondo, al kiu homoj ju pli sopiras, des pli malentuziasmigas ilin la potenculoj de politiko, ekonomio kaj religio. La Esperanto-movado devos oferti al ili familian etoson, tion montras la ankoraŭ florantaj aranĝoj.



Sed ankaŭ ekster tiuj rondoj de simpatiantoj intertempe pli multaj homoj konstatas, ke la ekzisto kaj funkcio de Esperanto estas fakto: Firmaoj baptas varojn per Esperantaj nomoj, posedantoj de ret-paĝoj petas tradukojn, kulturaj instancoj invitas al partopreno en agadoj, la gazetaro bonvole raportas, kaj ĉie ajn, kie temas pri versioj en laŭeble multaj lingvoj, oni provas aldoni "memkompreneble" ankaŭ Esperanton.

GEA estas preta kaj kapabla, uzi tiujn eblojn kaj helpi, ke Esperanto plifortigu sian rolon de memkomprenebla ĉarma kultura ornamaĵo en la socio. La financoj de GEA estas stabilaj, la revuo "Esperanto aktuell", kvankam ĝuste kun nova redaktisto, aperos plu regule. GEJ refortiĝas per novaj aktivuloj, kiuj bone kunlaboras kun GEA. Oni do povas

pozitive resumi: Malgraŭ la problemo de postulema klientaro kaj mankantaj aktivuloj, GEA vidas certan sukceson de sia agado. Eĉ se la membronombro ŝrumpis, tio ne nepre validas por la klientaro: Esperanto en Germanujo ne estas en danĝero.

**Rudolf Fischer** (GEA-prezidanto)

## **HUNGARAJ ESPERANTISTOJ INFORMAS PRI EU-AJ AFEROJ EN ESPERANTO**

En Hungario ekzistas grupo de civilaj organizoj, kiuj iomete estas interesiĝantaj pri eŭropuniaj aferoj. El tiu vidpunkto inter ili motoro estas la Budapeŝta Eŭropa Domo, kies direktoro estas ano de la Eŭropa Ekonomia kaj Sociala Komitato (EESK). Li havas sufiĉe vastajn interrilatojn kun enlandaj kaj eŭropaj politikistoj. Tiu Eŭropa Domo ofte okazigas por la menciita grupo kunvenojn, internaciajn konferencojn, kie gravuloj (hungaraj politikistoj, anoj de EESK, reprezentantoj de ambasadoj, fakuloj) estas prelegantoj. Pri tiaj aranĝoj vi povas iom detale informiĝi sur mia hejmpaĝo (pri 2008-2010).

Ekde 2005 mi preskaŭ ĉiam estis partoprenanto (en la nomo de HEA) en la kunvenoj kaj konferencoj. Inter la Eŭropa Domo kaj mi sufiĉe bona interrilato estiĝis, pro mia ofta ĉeesto kaj ke kelkfoje mi alparolis por Esperanto, kio havis sufiĉe bonan akcepton. Do por la Eŭropa Domo estis normala afero, ke inter la interesiĝantaj civilaj organizoj ĉeestas ankaŭ la Hungaria Esperanto Asocio, alinome la esperantistoj (ĉar ne nur mi estis tia partoprenanto), kaj estis por ĝi nia iniciato pri nia partopreno en la informado Esperante dum la EU-prezidado.

Nia celo kaj supozo koncerne la informadon estas jena.



Belgio transdonas la flagon al Hungario

Aperigi informojn en Esperanto helpe de aparta hejmpaĝo. Esperantistoj, interesiĝantaj pri aferoj de la Eŭropa Unio, utiligas la informojn en naciaj lingvoj kaj (almenaŭ) donas al ni opiniojn aŭ rimarkojn. Kolektinte la opiniojn ni foje-foje donas kaj transdonas al la Eŭropa Domo hungare resumojn pri la opinioj. Per tia procezo ni prezentus al la hungara civila EU-laborgrupo (kaj pere de ĝi ankaŭ al la registaraj institucioj) la eblan rolon de Esperanto en la informado pri eŭropuniaj politikaj kaj sociaj aferoj.

Mi daŭre laboras por la efektivigo de nia iniciato informadi en Esperanto pri la hungara prezidado al la Eŭropa Konsilio, kiu okazas en la unua duono de 2011. Tio okazas per la hejmpaĝo [www.vilagnyelv.tripod.com](http://www.vilagnyelv.tripod.com). La hungaran civilan socion pri tio informis la Eŭropa Domo en sia propra novaĵletero. Ankaŭ HEA donis informojn pri tio.

Laŭ mi estus bezone, ke almenaŭ malgranda grupo de eŭropaj esperantistoj interesiĝu pli vigle pri konkretaj, aktualaj eŭropaj aferoj. Kial penadi al la akceptigo de Esperanto, se en la ĉiutaga socia vivo ni ne emas aŭ eĉ rezistas uzi ĝin?

Mi invitas eŭropajneesperantistojn studi la de ni publikigitajn informojn, laŭeble utiligi ilin loka kaj almenaŭ doni al ni rimarkojn, opiniojn.

*László Gadosx*

## Esperanto en la interpretista trejnado en Strasburgo

**venu al STRASBURGO !**

Financial Crisis  
Peak Oil  
& You  
*Or, How To Build A Lifeboat.*

La 15an de februaro 2011, en la universitato pri interpretado, ni bonvenigos Nicole Foss, kunredaktanto de Automatic Earth.  
Ŝi prelegos per la angla, la studentoj interpretos en la francan, kaj Istvan Ertl kaj Cyrille Hurstel interpretos en Esperanton.  
Vi povos demandi per iu ajn el la tri lingvoj !



Ms. Nicole Foss  
Co-Editor  
The automatic Earth

La 15-an de februaro 2011 en la universitato pri interpretado la strasburga klubo bonvenigos Nicole Foss, kunredaktantinon de Automatic Earth.

Ŝi prelegos en la angla, la studentoj interpretos en la francan, kaj Istvan Ertl kaj Cyrille Hurstel interpretos en Esperanton.

Vi povos demandi per iu ajn el la tri lingvoj !

Tiu evento estos parto de la oficiala trejnado de la studentoj.

La evento estas oficiale kunorganizita de la universitato, kaj de la "cirklo de la katedralo", asocio kiu kunigas ĉiujn asociojn kiuj rilatas kun la eŭropeco de Strasburgo. La evento estos do larĝe malfermita al multe da tavoloj de la socio.

Estos pli interese kun ĉeesto de homoj kiuj vere bezonas interpretadon al Esperanto.

### Cyrille Hurstel

Sekretario de la strasburga klubo de Esperanto.

## LINGVO-ORG TRE REKOMENDINDA



[www.lingvo.org](http://www.lingvo.org) (paĝaro aranĝata de Aaron Irving nome de UEA) estas vere bona konsulta paĝaro ankaŭ por eŭropaj E-aktivuloj. Sur ĝi troviĝas diverslingvaj tradukoj de la resumo de Grin-raporto, la tuta Grin-raporto, Praga rezolucio en multaj lingvoj, diversaj dokumentoj pri prezento de priesperantaj diskutoj en Eŭropa Parlamento kaj aliaj dokumentoj. Ne forgesu tiun paĝaron, kiam vi referencas al dokumentoj oficialaj.

### Zlatko Tišljar

## **SENERFORTO : eŭropa esplorprojekto referencas al Esperanto**



En la Senperforto-projekto 14 partneroj en 8 Eŭropaj landoj (Portugaliao, Grekio, Nederlando, Irlando, Hispanio, Hungario, Belgio kaj Malto)

kunigas iliajn fortojn por malpliigi perforton rilatan al sekso kaj seksa rolo en eŭropaj akcepto- kaj azilcentroj. La projekto celas krei klaran referencadron por ĝia preventado kaj ricevis la subtenon de la Eŭropa Komisiono. Kunordigas ĝin sinjorinoj Ines Keygnaert kaj prof. Marleen Temmerman de la International Centre for Reproductive Health (ICRH) de la universitato Gent (Belgio).

La [invitilo](#) al la eŭropa seminario je la 10a decembro 2010 en Bruselo enhavis referencon al Esperanto nome ke Senperforto estas en Esperanto kun klarigo en la angla, nederlanda kaj franca. Ligo al la invitilo :

<http://www.icrh.org/files/Senperforto%20Seminar%20Invitation%20.pdf>

*Herman Deceuninck*

## **SVISA ESPERANTO-KONGRESO**

Bv veni al Lugano la 26-an de marto 2011!

Svisaj esperantistoj kunvenos en Hotelo Pestalozzi. Por mendi ĉambron, bonvolu uzi jenan retadreson:

<http://bluewin.ch>

Se vi deziras aliĝi al la komuna tagmanĝo, bv mendi rekte al mi. Ni tre antaŭĝojas renkonti vin.

Elkore salutas Mirejo Grosjean, kun-prezidanto de Svisa Esperanto Societo

SVISA ESPERANTO SOCIETO

*Mireille Grosjean*

[mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com)

## **NOVA AGNOSKO DE ESPERANTO ĈE VERDULOJ**

La Eŭropa Federacio de la Junaj Verduloj (FYEG) enmetis la tradukon pri sia deklario en ESPERANTO. Vidu ĉe la jena paĝo <http://www.fyeg.org/main/index.php/about-fyeg#esperanto> . Ĝi estas la kvara lingvo en kiu la deklario aperas.

*Manfred Westermeyer*

## Kiu lingvo estas vere natura?

Profesoro François Grin pri la graveco de la angla kiel universala lingvo kaj pri la estonteco de Esperanto.

### KOOPGAZETO: Kial planlingvoj ne povis venki?

**FRANÇOIS GRIN:** Bezonatus internacie kunordigita konvencio, kiel estis la kazo ĉe la transpreno de la metra sistemo. Tiu-ĉi taksatis kiel pli praktika kaj malpli kosta. La Ligo de Nacioj, antaŭa organizo de UNO inter la du mondmilitoj, jam proksimiĝis al la punkto fari Esperanton sia oficiala lingvo. Sed Francio tion haltigis. Hodiaŭ la anglosaksaj landoj kontraŭas. Por la plimulto de la eŭropanoj estus ekz. ekonomie avantaĝo, se Esperanto iĝus aldona oficiala lingvo.



### Lingvo certe bezonas kulturon kiel portanton?

Estas dubeble. Kelkaj homoj asertas, ke la angla estas ĝuste eble tial tiom sukcesa, ĉar ĝi sendependiĝis de la anglosaksa kulturo. La anglan oni ligas kun potenco kaj influo. Ĝi estas prestiĝa lingvo.

### Plia objeto kontraŭ planlingvoj estas ke ili estas artefaritaj.

Kiu lingvo estas natura? Neniu! Ĉiu lingvo estas prilaborita. Prenu kiel ekzemplon la islandan. En tiu lingvo oni ne transprenas fremdlingvajn vortojn, sed oni kreas novajn vortojn por novaj fenomenoj.

### La tuta mondo parolas la anglan...

La mondo ne parolas la anglan. Ses procentoj de la monda loĝantaro havas la anglan kiel gepatran lingvon, ses pluaj procentoj parolas la anglan flue. Multegaj homoj scipovas nur kelkajn frazojn kaj vortojn.

### Ĉu planlingvoj havas ŝancon?

Principe, jes. Dependas de tio, ĉu la opaj landoj atendas akiri avantaĝon per tio. En plurlingva mondo Esperanto povus esti helpo, komplemento – sed ne anstataŭanto de aliaj lingvoj. Kiel jam dirite, necesus internacia konvencio por apliki tian lingvon.

Intervjuis: Daniel Sägger, Coopzeitung.

Traduko el la germana: Kurt Fischer

Temas pri artikolo aperinta en Coopzeitung Nr. 27, la 3an de julio 2007.

[http://epaper.coopzeitung.ch/pdf.cfm?issuename=200727d&issuepage=0727CZ40\\_066\\_000003.pdf](http://epaper.coopzeitung.ch/pdf.cfm?issuename=200727d&issuepage=0727CZ40_066_000003.pdf)

## REAGE AL RAPORTO PRI EUNoM-KONFERENCO



European Universities' Network on Multilingualism

La raporteto pri EUNoM (Eŭropa Retejo pri Multlingveco) en la novembra numero de EB meritas komenton de la organizinta instituto mem. Ja mi nur mallonge ĉeestis ĝin kiel eksterulo. Tial mi invitis la Frisan Akademion (pli precize: "Mercator Kenniscentrum") reagi al mia teksto.

Al tio mi ricevis afablan leteron kun jenaj rimarkigoj:

1) La celo de la EUNoM projekto estas rigardi freŝokule la fenomenon 'plurlingveco'. La kaŭzo estas ke lingvo kaj plurlingveco ludas pli grandan rolon en la aktuala tutmonda socio kaj sci-ekonomio ol antaŭe. La projekto klopodas kontribui al la evoluigado de plurlingveco ene de Eŭropo en tiu senco ke eŭropanoj povu komuniki en pluraj lingvoj, ankaŭ en la sciencoj.

Ekzemplo de ebligado de komunikado en la frisa lingvo estas la edukaranĝoj en preskaŭ 500 bazaj lernejoj de Frislando mem:

(a) ĉiuj lernejoj instruas la frisan lingvon kiel lernfakon; la plimultaj lernejoj ankaŭ uzas la frisan iom kiel komuniklingvo ĉe sociaj kaj kulturaj lernterenoj;

(b) minimume 100 bazaj lernejoj uzas la frisan dum unu posttagmezo aŭ dum la tuta tago ĉe ĉiuj lernfakoj kaj sur ĉiuj lernterenoj;

(c) 40 bazaj lernejoj organiziĝas laŭ la modelo de trilingva lernejo: krom la nederlanda uzatas la frisa kiel instrulingvo ekde grupo 1; la anglan oni enkondukas ekde grupo 5 kaj nur en grupo 7 oni praktikas la anglan dum unu tagoparto en semajno - malofte la tutan tagon – uzante la anglan kiel instrulingvo. Al mia demando "Ĉu la esplorinstitutoj havas aŭ favoras propran praktikon de multlingveco?" la letero enhavas afirman respondon. Parto de la simpozio estis dediĉita al 'The multilingual university' por paroli pri la faktoroj kiuj ludas rolon en la strebado al plurlingva universitato. Interesa koncerna lekcio estis tiu de Heidi Rontu pri kiel en Aalto Universitato (Aalto-yliopisto, Aalto-universitetet), dulingva universitato en Finnlando, oni evoluigas kaj praktikas lingvo-politikon. Ankaŭ Cecilia Serra donis bonan informadon pri la eblecoj kaj la limoj de plurlingveco ene de Svisaj universitatoj. Ambaŭ lekcionoj donis al ni multe da materialo pripensenda por plua evoluigo de aktiva plurlingveco en la pli altaj edukinstitutoj kaj en la sciencoj.

Al mia demando "Ĉu la institutoj kaj universitatoj problemigas kaj esploras la demandon de potenco de lingvoj kiu malhelpas la atingon de egalrajteco inter lingvoj en socio aŭ en grupoj?" la korespondanto de Frisa Akademio respondis: "La fakto, ke EUNoM klopodas progresigi plurlingvecon implicas, ke la projekto ne submetiĝas al la ekzistantaj potencostrukturoj de lingvoj." Ankaŭ oni diskutis en speciala diskutgrupo pri "faktoroj kaj strategioj kiuj povas rezultigi ĉe entreprenoj kaj instancoj konvinkiĝon pri la valoro de multlingveco."

Fine la reprezentanto de 'Mercator Kenniscentrum' koncedis ke jes paradokse estas, ke oni diskutas pri plurlingveco en la angla, sed "oni ne havis la impreson ke tial, surbaze de la posttaksado fare de la partoprenintoj, la prezentadoj kaj diskutoj en la simpozio estis malpli bone komprenataj."

Cetere ĉiuj povas uzi sur la enreta diskutforumo <http://eunom.proboards.com/index.cgi> la lingvon kiun li deziras.

*Johan Derks*

---



## **AEPA - Apliko de Esperanto en la profesia agado**

Bulgara Esperanto-Asocio, AIS- Bulgario kaj Internacia Universitato Karlovo planas Simpozion

"Apliko de Esperanto en la profesia agado" en Karlovo de la 11a ĝis la 16a de junio 2011.

Oni antaŭvidas specialajn fakkunvenojn pri ekonomiko, E-instruado, interlingvistiko, komerco, ekologio, informadiko, medicino kaj aliaj fakoj. Se estos partoprenontoj, kiuj interesiĝas pri ekonomikaj kaj komercaj problemoj, oni certigos por ili apartan ĉambron por diskutoj, organizos renkonton kun bulgaraj firmaoj kaj tiamaniere kontribuos por iliaj profesiaj kontaktoj uzante Esperanton kiel kontaktlingvo.

Prof. Boĵidar Leonov, prezidanto de BEA kaj AIS\_Bulgario, proponas, ke IKEF estu unu de la kunorganizantoj de AEPA-2011, kune kun aliaj fakaj organizaĵoj kiel ekzemple la Scienc-teknika Asocio en Bulgario, Komitato por kulturo kaj edukado, k.a.

Li petas por morala subteno de tiu grava por la E-movado faka aranĝo.

***Roland Rotsaert***

## **Brita Esperanto-Kongreso en Eastbourne 2011.**



Bonvolu aliĝi per <http://www.skotlando.org/brita-kongreso-esperanta-versio/la-brita-kongreso-de-esperanto-2011/pri-la-kongreso/>

Nia gastpreleganto estos Ziko van Dijk [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ziko\\_van\\_Dijk](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ziko_van_Dijk)

Eastbourne estas bela marborda urbo, kaj la plej proksima al Eŭropaj landoj. Facile atingeblas per 'Eurostar' kun rekta fervoja lineo de Ashford Internacia Stacidomo, kaj de Gatwick flughaveno. La kongresejo estas la granda bone-konata lernejo 'Eastbourne College' <http://epo.wikitrans.net>

[/Eastbourne\\_College?eng=Eastbourne+College](#)

Preskaŭ nekredebla prezo: La tuta tri-taga kongreso kostas nur £45 kaj INKLUZIVAS vendreda bufedo , kun mez-taga manĝaĵo sabaton kaj dimanĉon.

Granda bankedo dimanĉe £20. Ni jam luis tutan hotelon apud la maro - favoraj prezoj por fruaj mendoj – ne necesas serĉi por vi mem. Menu per la aliĝilo kaj pagu poste:( unuope) £38 po nokto.

Aliaj loĝeblecoj por junuloj eblas – kontrolu je <http://www.visiteastbourne.com/accommodation.asp>

[http://www.esperanto-gb.org/eab/eab\\_events/bk2011\\_payment-eo.htm](http://www.esperanto-gb.org/eab/eab_events/bk2011_payment-eo.htm)

Venu are, apudmare. Ni bonvenigos vin !

## KROATA URBETO KOPRIVNICA ELEKTIS ESPERANTISTON PERSONO DE LA JARO 2010



Kroata urbeto Koprivnica elektas per interretaj voĉdonadoj ĉiujare personon de la jaro. Ankaŭ fine de 2010 estis dekkvino da kandidatoj, inter ili Kruno Puškar, kiun oni kandidatigis pro lia aktiva engaĝiĝo pri Esperanto. Li gvidis tutjare en la urbeto kurson de Esperanto por trideko da Koprivnicanoj, kiuj entuziasme lernis. Kaj li estis elektita per granda plimulto da voĉoj kiel persono de la jaro 2010.

Kruno Puškar naskiĝis la 31-an de marto 1986 en Koprivnica, finis bazan lernejon kaj gimnazion en Križevci. Li studis en Filozofia fakultato en Zagrebo. Tie li preparas la diplomlaboraĵon en la germanistika fako pri la temo Esperanto kiel Eŭropa Lingvofrankao. Ekde 2009 li studas ankaŭ la ĉinan kaj ekde 2010 la japanan. Esperanton li lernis ĉe doktoro Velimir Piškorec en la Filozofia Fakultato de Zagrebo dum la studjaro 2008/2009. Poste li fariĝis ankaŭ estrarano de KEJA (Kroatia E-Junulara Asocio).

*Zlatko Tišljarić*

## Eŭropa Bulteno. 2011. N° 1 (101) Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

**Finredaktita:** 2011-02-01

**Redaktoro:** *Zlatko Tišljarić*

**Kunlaborantoj:** *Seán Ó Riain, Rudolf Fischer, László Gados, Cyrille Hurstel, Herman Deceuninck, Mireille Grosjean, Manfred Westermeyer, Johan Derks, Roland Rotsaert.*

**Teknika redaktoro:** *Raymond Gerard*

**Leterojn kaj komentojn sendu al EEU:**

**Rete:** [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

<http://www.gazetejo.org>

**Ligiloj:**

- <http://dublincore.org/documents/dcmi-terms/>: DCMi Metadata Terms
- <http://www.wix.com/dtislar/europo>: Europaj valoroj
- <http://www.vilagnyelv.tripod.com/>: Aktualajoj en la EU
- <http://edukado.net/upload/enhavo/dosieroj/anoncoj/VENU%20a%20STRASBURGO%20%21%5B1%5D.pdf>: Venu al Strasburgo
- <http://edukado.net/uzanto?id=7189>: edukado.net → / Ĉefpaĝo / Ensaluti & Registriĝi
- <http://www.lingvo.org/>: lingvo.org
- <http://www.icrh.org/files/Senperforto%20Seminar%20Invitation%20.pdf>: Senperforto seminar invitation
- <http://bluewin.ch/>: Web News online - Aktuelles - Swisscom - Aktuelle Nachrichten - Neuigkeiten
- <http://gmail.com/>: gmail poŝtkesto
- <http://www.fyeg.org/main/index.php/about-fyeg#esperanto>: La Federacio de Junaj Eŭropaj Verduloj (FYEG)
- [http://epaper.coopzeitung.ch/pdf.cfm?issuename=200727d&issuepage=0727CZ40\\_066\\_000003.pdf](http://epaper.coopzeitung.ch/pdf.cfm?issuename=200727d&issuepage=0727CZ40_066_000003.pdf): «Welche Sprache ist schon natürlich?»
- <http://eunom.proboards.com/index.cgi>: Forum eunom
- <http://www.skotlando.org/brita-kongreso-esperanta-versio/la-brita-kongreso-de-esperanto-2011/pri-la-kongreso/>: Pri La Kongreso: Esperanto
- [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ziko\\_van\\_Dijk](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ziko_van_Dijk): Ziko van Dijk - Vikipedio
- [http://epo.wikitrans.net/Eastbourne\\_College?eng=Eastbourne+College](http://epo.wikitrans.net/Eastbourne_College?eng=Eastbourne+College): Eastbourne College - Wikipedia's Eastbourne College as translated by GramTrans
- <http://www.visiteastbourne.com/accommodation/default.aspx>: Accommodation, Where To Stay & Places In Eastbourne, East Sussex
- [http://www.esperanto-gb.org/eab/eab\\_events/bk2011\\_payment-eo.htm](http://www.esperanto-gb.org/eab/eab_events/bk2011_payment-eo.htm): Esperanto Association of Britain - EAB Payment